

SCIENCA REVUO

volas

- (1) subteni la ĝeneralan sciencan nivelon de sia legantaro, pri ĉiaj temoj;
- (2) helpi al la fratiĝo de la homoj, libere diskutigante pri la distigaj konceptoj laŭ sciencaj normoj;
- (3) science studi la problemojn de la Esperantismo;
- (4) evoluigi la lingvon laŭ sciencaj bezonoj, surbaze de la principo de sufiĉo kaj neceso.

Por tiu celo ĝi bezonas ne nur redakcion kaj legantojn, sed ankaŭ verkantojn.

Vidu ankaŭ paĝon 3 de la kovrilo de la unua numero de tiu ĉi jarkolekto.

D-ro W. Manders

INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

ENHAVO

Interlingvistika parto

- Ĉapitro I | *La interlingvistiko kaj Esperanto.*
Ĉapitro II | *La naturalismo de Edgar de Wahl kaj Otto Jespersen.*
Ĉapitro III | *La naturalismo de IALA.*

Esperantologia parto

- Ĉapitro IV | *Taskoj de la esperantologio.*
Ĉapitro V | *La evoluo de Esperanto. Lingva korekteco*
Ĉapitro VI | *Kompara esperantologio.*

prezo 2.25 Ned. guld. / £ —.5.— / \$ —.75

J. MUUSSES — ELDONISTO

Purmerend - Nederlando

Vol. 9-a. N-ro 1-a (33-a)

Paĝoj 1-32

1-7-1957

UDK 001(05) = 089.2(100)

1

SCIENCA REVUO

ELDONO DE J. MUUSSES PURMEREND NEDERLANDO

Sendependa revuo. Aperas kvarfoje jare. Ab.pr. Ned. gld. 5.-, \$ 1.50, aŭ egalvaloro. Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.)

Redaktoroj: D-do G. F. Makkink kaj D-ro W. P. Roelofs. **Sekretariino de la Redakcio:** F-ino N. Kool, West-Graafdiijk (N.H.), Nederlando. **Reprezentanto por I.S.A.E.:** G. F. Makkink, Eekhoornlaan 1, Bennekom, Nederlando. **Administracia adreso por abonantoj, kiuj ne estas membroj de I.S.A.E.:** J. Muusses, Purmerend, Nederlando, Ĝironumero 15062 - **Sekretario de I.S.A.E.:** Prof. D-ro Dušan Brkić, Vojvode Putnika 118/V, Serajevo, Jugoslavio.

ENHAVO: paĝo

Donacanto de senmorteco. — <i>Miroslava Rektorisová</i>	1
La Ĉarto de la Nova Tero. — <i>La Homoj de la Arboj</i>	5
La gramatika strukturo de la angla lingvo kompare kun tiu de Esperanto. — <i>Prof. D-ro W. E. Collinson</i>	6
La maro en la internacia juro. — <i>Prof. D-ro I. Lapenna</i>	14
Recenzoj kaj Bibliografio	26
<i>J. S. Weiner: The Piltdown Forgery</i> — La falsajo de Piltdown. — <i>T. L. C. Bluett</i>	26
<i>Gaston Waringhien: Eseoj I. Beletro.</i> — <i>G. F. Makkink</i>	28
<i>William Auld: La infana raso. Poemo en 25 ĉapitroj.</i> — <i>G. F. Makkink</i>	29
<i>Delfi Dalmau: Dialekto, dialektiko.</i> — <i>G. F. Makkink</i>	29
<i>J. Cresswell kaj J. Hartley: Teach yourself Esperanto.</i> — <i>W. P. Roelofs</i>	30
<i>Joh. Riechert: Ökonomie des Studierens.</i> — <i>E. Hölscher</i>	31
<i>Voltaire (E. Lanti): Tri verkoj de Volter.</i> — <i>W. P. Roelofs</i>	32

DONACANTO DE SENMORTECO 7.025 : 09

de MIROSLAVA REKTORISOVÁ

Fuma kolono, ŝtonetoj kaj cindro kovris en la urboj Pompei kaj Herculaneum trezorojn de antika beleco kaj skribajn dokumentojn pri vivo de homoj, kiuj sciis ilin krei. Volvaĵon de papiruso oni trovis post iom da tempo — sed ili estis karbiĝintaj. Sian sekreton malkaŝis nur tiuj, kiuj estis malpli difektitaj. Ĝis hodiaŭ oni ne sukcesis malvolvi plejparton de ili kvankam provis tion pro honoro kaj gloro la plej eminentaj fizikistoj, kemiistoj kaj konservistoj de la tuta mondo dum dekoj da jaroj. Vane. La rezulto estis, ke ekzistas da tiaj volvaĵoj malpli. Ili disfalis sub manoj de la esplorantoj.

Ni povas konsideri feliĉo, ke la lasta vorto en tiu ĉi afero ne estis dirita. Kiu scias, ĉu la ŝlosilon al la mistero de Herculaneum ne havas la modesta, nenies atenton vekanta viro, ĉiam okupanta sin pri iu ŝajne malgrava laboro en la kaŝita laborejo por konservado de la Universitata biblioteko en Praha. Ni iru viziti lin!

Varma lumo de lampo ultraruĝa lumigas parton de tablo kaj super ĝi du manojn. Mano maldekstra delikate, singarde tenas volvaĵon da karbiĝinta papero kaj la dekstra mano, apenaŭ tuŝante la rompeblan rulaĵon, surmetas sur ĝin, sur spacon de unu milimetro post la alia, travideblan gluecan likvaĵon. Atenton! Ne ternu, ne spiru! Sufiĉas senpripensa, iom pli subita movo kaj sur la tablo restos mizera amaseto da fulgo. La manoj, kies larĝvizaĝa posedanto kun okuloj de bonulo sidas jam en duonkrepusko, aspektas nelertaj. Multe pli frue, antaŭ ol Ladislav Sedlecký supozis, ke li okupos sin pri konservado de dokumentoj, laboris tiuj manoj en vitrofabriko. Li glatigadis barokan vitron kaj dum tiu laboro la varmega vitromaterio difektis sentemon de lia dekstra mano kaj donis al ĝi formon preskaŭ ovalan. La manplato perdis la kapablon komplete fermiĝi. La revolucio en majo 1945, kiam Sedlecký helpis peli la Hitler-armeon, postlasis ankaŭ kelkajn vundojn. Dum veturo en kirasita vagonaro trafis lian brakon pluraj pafoj. Oni konsterniĝas, kun kia sento kaj lerteco li nun procedas.

Ĉu la karbiĝinta rulaĵo obeos homan volon? Ĉu ĝi ne disfalos? La homo sub lampo laboras koncentriĝinte, senvorte. La travidebla poliamida tegaĵo rapide sekiĝas. Dum tio ĝi iomete ŝrumpas. Tiel ĝi devigas la volvaĵon, ke ĝi malvolvu sin. Ĝi mem laboras. Anstataŭ homo. Kaj vere, nun la rompiĝema nenio kvazaŭ disetendas sin el sia dormo. Kiam la nigra rulaĵo estas flegita per tiu ĉi vivodona akvo de unu flanko, la viro en la duonmallumo kontente ekzumas: „Nun sekvos frandaĵo. La dua flanko estos farita rapidege, unu-du”. Post kelkaj minutoj kuŝas sur la tablo obeeme rektigita longforma ortangulo de nigriĝinta papero. Ĝi reviviĝis — kaj protektata per poliamida filmo ĝi estas nun senmorta. Estas vere, ke la skribaj trajtoj ne estas klaraj. Ilin konvene atakos preskaŭ tanĝe alfalanta lumo aŭ ultraruĝaj radioj. La laboro sukcesis. Saĝa kapo kaj lertaj manoj superruzis la fajron.

Al milionoj da volumoj de plej raraj antikvaj libroj kaj manuskriptoj, kuŝantaj en ĉeĥaj kaj slovakaj stud-bibliotekoj senĉese aldoniĝas valoraj kolektoj el estintaj monakejoj kaj kasteloj. Trezoroj de homa spirito kaj de arto presista kaj librobindista. Ili kompreneble havas siajn malamikojn: ŝimon, anobiojn, mikrobojn, malsekon kaj legiojn da pliaj. Da paperaj pacientoj ripozas en la trezorujoj de la ŝtataj bibliotekoj proksimume dumil. Plejparto el ili devus migri al la konservejo en Klementinum, la universitato de Praha. Antaŭe estis kutimo, ke difektitan manuskripton oni konservis sub sep serurojn kaj

aldonis biletan „Ne pruntedonota! Ĉefkonsilisto tiu kaj tiu.” La sorto de multaj unikaĵoj estis tial simila al la sorto de ĉeĥa historia manuskripto de ĉeĥa nobelo Marek Bydžovský de Florentin, temanta pri la reĝo Zikmund. En tiun dokumenton boris korodo de inko verajn artezajn putojn. Simile okazis pri historiaj fontoj en biblioteko de la Krucordeno, el kiuj ĉerpis la ĉeĥa historiisto Palacký kaj eĉ pri la Granda Didaktiko de Jan Amos Komenský. Tiam estas jam malfrue serĉi konsilon. Se la verkoj estas transdonitaj al riparo ĝustatempe, tiam estas bona rezulto preskaŭ certa. Sed kia ajn estu la diagnozo, la operacio estas kutime longdaŭra.

Sur tableto, aŭ — se vi preferas — sur operacia tablo, kuŝas la Urba libro de Košice. Ĝia aĝo estas kvincent jaroj. Ĝi aspektas konvene. Kvazaŭ la bataloj, ĝojoj kaj suferoj de la urbo estus lasintaj postsignojn de sulkoj en ĝia vizaĝo. Plej profundajn kaj plej akrajn ĉe la rando. Se vi provos turni la folion, restos inter la fingroj peco de la paperangulo. La libro putras. La ĥirurgoj kompreneble scias, kion fari pri ĝi. Sed la klasikaj metodoj konservaj estas longdaŭraj kaj ofte maldelikataj. Juĝu mem!

Estas necese fari la valorajn dokumentojn, kiujn minacas danĝero, pli rigidaj. Iam sufiĉas kovri la surfacon per delikatega reto el natura silko kaj la dokumento estas poste sub travidebla vualo. Tio estas ĝenerale simpla. Tio tamen ne sufiĉas, se la grado de la disfalo estas pli alta. En tiu okazo estas plej bone enŝovi la reton rekte en la paperon. Kaj provu dividi paperfolion en du egalajn tavolojn, por ke ne estu eltirita eĉ peceto de ĝi kaj por ke ne restu eĉ unu malgranda litero sur la malĝusta flanko! Ĝis nun sufiĉis al la konservisto glata kotona tolo, kiujn li gluis per gluo sur ambaŭ flankojn de la dokumento. Poste restis nur la tasko, meĥanike, pacience dividi la tavolojn, sinsekve pecon post peco. Akvo ne toleras gluon, kaj oni do devas labori seke. Tiel oni amuzas sin pri unusola paĝo dum tuta tago (se enestas en la papero ia ne-regulaĵo aŭ grasa makulo, la laboro eĉ kun tiu ĉi atento ne sukcesos perfekte). Poste oni engluas senpere en la internon de la fendita folio silkan reton kaj la helpan tolon oni forigas. Se estas necese, oni kompletigas mankantajn partojn de la dokumento per enverŝo de papera materio. Kalkulu, kiel senfina estas tiu ĉi procedo, se estas prilaborataj kelkaj centoj da paĝoj.

La paciento de Košice ne estos tamen longe sub la operaciilo. La bonintenca ĥirurgo mallongigis procedon de tuta tago al unu horo. Nun li trempas la penikon en la saman miraklan likvaĵon kiel tiam, kiam li reviviĝis la karbiĝintan paperon. La tegaĵo energie algluiĝas al la riparata dokumento kaj ĝi anstataŭas gluon kaj tolon. Ĝi ne evitas akvon. „Akvo do laboru!” konsilis al si la eltrovinto. Varma akvo penetras inter ambaŭ surfacajn tegaĵojn, dissolvas la paperan materion

kaj ĉar la filmo iomete ŝrumpas, sur ĉiu flanko laŭ alia direkto; la papero dividiĝas mem — sen danĝero, ke ĝi difektiĝos. La posta procedo estas jam la sama. La diferenco estas, ke la nova metodo la dokumenton konservas kaj samtempe plifirmigas, tiel ke la antaŭa lanugaĵo estas nun pli firma ol ŝtalo. Antaŭe tute ne estis ebla dividi delikatan paperon t.n. biblian. Laŭ maniero de Ladislav Sedlecký oni povas fendi same paperon historian, kiel nuntempan, fortan, aŭ malfortan, sanan kaj putrantan. KREDU MIN Aŭ NE: mi vidis tie eĉ mirindan disfendon de delikatega cigareda papero.

Kun fido kaj sen timo ni povas nun rigardi kadukiĝintajn librojn, kun akra malbonodoro de kadukaĵo. Tute certe revenos al denova vivo la praantikva verko pri agado de Tomaso de Kempis, kuŝanta ĉe mano de Sedlecký, ankaŭ la endanĝerigita korespondaĵo de ĉeĥa verkistino Božena Němcová aŭ la eriĝanta letero de la poeto Karel Hynek Mácha. Pluvivos ankaŭ raraj gazetnumeroj.

Ladislav Sedlecký estas patro de kelkaj inventoj. Sian metodon pri savo de karbiĝintaj manuskriptoj li dediĉis al sia instituto kaj li atendas, kiam la ministerio de kulturo kaj instruado akceptos lian patenton.

Laborkondiĉoj de Sedlecký ne estas ĝuste idealaj. Kaserolo, peniko, kuirilo, lampo, kiu ja malutilas liajn okulojn, jen estas preskaŭ ĉio. Por havi la nepre bezonatan akvon li devas ĉiam migri en la koridoron. Kaj anstataŭ pri Vesuvo kaj pri Pompei, li sonĝas prefere kuraĝan sonĝon pri sesdek kvadrataj metroj da spaco por laboratorio, kiujn promesis al li pasintjare ministro de instruado.

Ĉu iaj trorapidaj konkludoj? Li ja ne konas la konsiston de la papirusoj de Herculaneum kaj li ne asertas, ke lia mirakla eliksiro helpas kontraŭ ĉiuj malsanoj. Sed eĉ se li ne posedas ŝlosilon al tiu ĉi mistero, li kapablas multegon. Liaj manoj ja donas senmortecon al vortoj de kronikistoj, pensuloj kaj poetoj!

Ŝajnas, ke la modesta laborejo en Klementinum estas pli honorata en eksterlando ol hejme. Skribas la Biblioteko de eksterlanda literaturo en Moskva kaj pola Biblioteko de Ossolinski, el Budapeŝt alvenis peto, ke hungara laborantino povu lerni ĉe niaj konservistoj. Bedaŭrinde tamen oni eĉ pensi ne povas pri gastoj. La provizora ekipo ne sufiĉas eĉ por la tripersona laborantaro. Oni mendis jam masonistojn kaj kun ili la laborantoj atendas disponigon de taŭga ĉambro. „Kiam fine ni povos ĝuste labori?” ili plendas en sia laborejo kaj timas pri la amasoj da endanĝerigitaj manuskriptoj en sciencaj bibliotekoj. „Eĉ dum tricent jaroj ni ne estos pretaj pri li, se ni laboros laŭ tiu ĉi rapideco.” Oni ne miru pri ilia aflikto! Ili konas la valoron de siaj raraj konfidatoj kaj la amplekson de la minacanta danĝero de detruo.

Laŭ „Literární noviny”, Praha, tradukis O. Ginz.

LA ĈARTO DE LA NOVA TERO.

Ni sugestas, ke se ni ne juste traktas la teron ni ne povas vivi korpe; se ni ne juste traktas niajn proksimulojn ni ne povas vivi socie; kaj se ni ne traktas la „superan memon” juste ni ne povas vivi plene kiel individuoj.

Ni kredas, ke devas disvolviĝi pli ampleksa kompreno pri la vera interrilato inter ĉiuj vivoformoj, kun la celo atingi naturan ekvilibron inter mineraloj, vegetaĵoj, bestoj kaj homoj, ĉar la homo dependas ĉefe de la teraj vegetaĵoj por sin nutri kaj vesti. Por akiri nutraĵon, vestaĵon kaj ŝirmon sur ĉi tiu planedo, ni devas varti la teron kaj, aparte, ne malhelpi senmotive la naturan akvocirkuladon, ĉar tia malhelpo jam kaŭzis grandan grundoperdon de sur la tuta terglobo; kaj ni devas pro la justeco redoni al la tero la forĵetaĵon de ĉio kion ni prenas de la tero.

Ni sugestas, ke la akvo devas esti baza konsideraĵo en ĉiuj niaj naciaj kaj tutmondaj forstaj programoj; al fluoj kaj riveroj oni devas redoni la naturan movon; inundojn kaj senakvaĵon oni devas forigi. Arbaroj kaj arbejoj intime rilatas kun biologia, socia kaj spirita bonstato.

La minimuma arbokovro por sekureco estas triono de la tuta tersurfaco. Ĉiu akvokapta regiono devus havi almenaŭ ĉi tiun proporcion de arbokovro, konsistanta el miksitaj specoj, inkluzive de larĝfoliaj arboj; unuspeca kulturo de kia ajn formo malutilas al la tero.

Ni kredas al la tradicia idealo, ke niaj kampoj devus esti „kampoj en arbaroj”, kiu signifas pejzaĝan kultivadon de ĉiu valo kaj ebena, kun arbaroj en altaj lokoj, ŝirmaj zonoj, fruktarbejoj el miksitaj specoj kaj heĝaj arboj ĉie.

**
*

La Konsilantaro de la Homoj de la Arboj bonvenigus kiel Fratulojn ĉiujn, kiuj simpatias kun la regeneraj celoj de la Societo, kaj kiuj deziras kunlabori kun ili por restarigi la necesan arbokovron.

Oni petas, ke Esperantistoj traduku la ĉi-supran ĉarton en la proprajn lingvojn (krom la anglan kaj francan lingvojn) kaj afable sendu la tradukaĵojn al ni.

El la anglalingva revuo „*Trees and Life*”, kies redaktoro estas Richard St. Barbe Baker. Administra oficejo: Aldridge Press Ltd., 27 Chancery Lane, LONDON W.C. 2.

Publikigitajn tradukojn oni sendu al s-ro J. W. Leslie, sekretario de Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W. 11.